



# TEA-BULTENO

10<sup>A</sup> JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2007

NUMEROJ 9-10

*Lingvo estas la haŭto de l' animo.*

*Fernando Lázaro Carreter*

## Ondas Jokohamo

Revenis mi el Japanio kun neforgeseblaj rememoroj pri interesoplenaj travivaĵoj: se mi fermas la okulojn, paradas bildoj de temploj, kies tegmenta finaĵo leviĝas supren al la ĉielo, kaj kvinetaĝaj pagodoj simbolantaj la teron, akvon, ĉielon, venton kaj fajron, de ĝardenoj, kies belecon kaj elegantecon oni malkovras en la simbola dismetado de rokoj, de ŝtonetoj tapiŝantaj la padon, de muskoj kun ĉiuj nuancoj de la verdo... Ne nur per la okuloj oni ĝuas tiujn harmoniajn scenejojn, sed ankaŭ per la oreloj, kiuj kaptas la apenaŭ percepteblan gutadon de akvo el bambua kaneto aŭ la susurantan plaŭdadon de eta akvofalo. La silento tie reganta invitas al meditado, al sinliberiĝo de ĉia malagrabra penso, al restado nur kun si mem kaj la ĉirkaŭanta naturo. En ĉio ĉi oni eltrovas la tipajn trajtojn de japanoj: simpleco, esenceco, sobreco.

Sed kion diri pri la moderna vizaĝo de Japanio? Por mi, vilaĝanino - jes, kompare kun la metropoloj tieaj, Triesto estas vilaĝo! - Tokio, Osaka, Jokohamo ŝajnis urboj el sciencfikciaj mondoj: arkitekturo ekstreme moderna, nubskrapulaj turoj el fascinaj formoj, kun fasadoj el kaheloj aŭ vitraĵoj, sur kiuj speguliĝas la konturoj de aŭtostratoj, trajnaj vojoj, pontoj unuj super la aliaj - nekredebla nodo preskaŭ malligebla!

Se iu sopiras al kutimoj kaj moroj alitempaj, kiam ĝentileco kaj bonaj manieroj estis naturaj ecoj de la homaro, nu iru al Japanio: en ĉi lando afableco, helpemo, amikiĝemo, kun akompano de varmaj ridetoj, kaj precipe sincera respekto al aliaj personoj havas ankoraŭ grandan signifon kaj estas esenca parto de ĉies edukiteco.

Tamen mi finas ĉi tie ĉi supraĵan priskribon de la travivitaj spertoj, ĉar pli bone "parolos" kaj fotoj kaj klarigoj dum la "Japana Vespero", oktobre, ĉe TEA-sidejo.

Kaj nun iom pri la 92<sup>a</sup> UK de Esperanto, kiu estis aparte grava pro la okazintaj elektoj de UEA-estraro, por la venonta trijara mandato.

Jen ties konsisto kaj disdivido de taskoj:

- Prezidanto - Probal Dasgupta, Barato - Hindio
- Vicprezidantoj - Claude Nourmont, Luksemburgio
- Ranieri Clerici, Italio
- Ĝenerala sekretario - Barbara Pietrzak, Pollando
- Estraranoj: Loes Demmendaal, Nederlando
- Hori Yasuo, Japanio
- Jose Antonio Vergara, Ĉilio

La Prezidanto Probal Dasgupta respondecos pri kunordigo kaj ĝenerala planado de la agado; la Vicprezidanto

Ranieri Clerici gvidos la eksterajn rilatojn de la Asocio, dum Claude Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj.

Barbara Pietrzak okupiĝos, krom pri kutimaj taskoj de ĝenerala sekretario, ankaŭ pri informado. Loes Demmendaal estos estrarano pri financo kaj administrado. Pri landa kaj regiona agado respondecos Hori Yasuo, dum Jose Antonio Vergara gvidos la fakan kaj sciencan agadon de UEA. La estraranoj dividos inter si poste ankoraŭ diversajn specifajn taskojn. Dum la proksimaj monatoj ili ankaŭ elektos multajn komisionojn kaj komisiitojn. Por pliaj informoj pri la ĵus elektita prezidanto de UEA, iru al [http://eo.wikipedia.org/wiki/Probal\\_Dasgupta](http://eo.wikipedia.org/wiki/Probal_Dasgupta)

Dum la UK en Jokohamo la Komitato starigis novan formon de honorigo: "Diplomo pri Elstara Agado", pri kies aljuĝo decidas la Estraro. Ĝiaj unuaj ricevantoj estas la germana Interkultura Centro Herzberg kaj s-ro Donald J. Harlow el Usono. La Centro en Herzberg famiĝis en la Esperanto-movado pro sia aktiva kaj altkvalita agado, kies elstara frukto estis la decido de la urbo Herzberg oficiale deklari sin Esperanto-urbo. S-ro Don Harlow estis diplomita pro pionira Esperanta aktivado en interreto.

Kaj nun la salutvortoj de Probal Dasgupta:

*"Mi estas estimanto de la amikecoj. Mi salutas vin en la nova rolo de via prezidanto, kiu havas la privilegian devon konstante aŭskulti vin. Esperanto estas speciale amika kaj aŭskultema lingvo.*

*Ni donis unikan formon al nia helpemo ekde 1914. Dum la Unua Mondmilito ni peris mesaĝojn, manĝaĵojn, medikamentojn inter la militantaj landoj. Ĉu nur dum milito aperas tiaj urĝoj? Ne! Ĉiam ekfajras krizaj bezonoj, ĉu pro subita tertremo ie, ĉu pro konstanta nutraĵomanko aliloke. Niaj helpemaj komunik-rimedoj devas ĉiam esti pretaj aŭdi la petojn de akutaj bezonantoj kaj trovi kapablulojn, kiuj tuje kaj taŭge fajrobrigados la fajrojn - precize kiel dum militoj.*

*Ĉu tia ĝeneralega, skolta helpemado - okupiĝanta pri viktimoj de inundoj, de malsatego, de tertremoj - estas vere prioritata en movado por neŭtrala mondlingvo? Ni jam respondis tiun demandon en 1914. Jes ja.*

*Ni estas helpema lingvanaro; ni kredas, ke la lingvoj devas per neŭtrala pontado plibonigi sian komunik-reton. Kial? Ĝuste ĉar la plej drastaj suferantoj bezonas esti atingataj kaj servataj fulmrapide. Eĉ sur pli banala nivelo, ni ĉiuj ja scias, ke la delegita reto kaj aliaj UEA-strukturoj estas absolutaj antaŭkondiĉoj por nia kolektiva ekzisto, pli gravaj ol la gramatiko.*



*La nuna estraro laboras por plifirmigi niajn instituciojn, ĝuste ĉar ni vidas en ili la esencon kaj estontecon de la zamenhofa lingvo. Venas 2008, kiun UN deklaris la Internacia Jaro de la Lingvoj; kaj ni centjariĝos!*

*Vi, kiuj kongresas, kaj precipe tiuj inter vi, kiuj staras ĉe la sojlo de UEA kaj ne en nia anaro, bonvolu ja aliĝi al la Asocio kaj kunagi kun ni!*

*Vi trovos, ke ni helpas atingi ankaŭ viajn celojn.*

### Rezolucio de la 92<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto

**La 92<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”;**

**Konstatinte**, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter “Okcidento” kaj “Oriento”, sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

**Konstatinte**, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

**Notinte**, ke tro rigidaj konceptoj pri “Okcidento” kaj “Oriento” malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

**Notinte kun kontento**, ke la 2008<sup>a</sup> jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

**Rekomendas**, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

**Konfirmas** la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

**Atentigas** samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

**Deklaras**, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

**Esprimas** la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.

### Kie la 93<sup>a</sup>? Kaj la 94<sup>a</sup> UK?

Kiel sciante, la jaro 2008 markos la centjaran jubileon de Universala Esperanto-Asocio, tial la estraro decidis kongresi en Roterdamo. Ekde 1955 ĝi estas la ĉefurbo de Esperantujo, ĉar tie situas la Centra Oficejo, kies domo estis lastatempe funde renovigita. En la CO troviĝas la Libroservo kaj Biblioteko HECTOR HODLER kaj en ĝi kunvenas la klubo MERKURIO fondita en 1906. Roterdamo gastigis jam du UK-ojn, en 1967 kaj 1988. La venontjara okazos de la 19<sup>a</sup> ĝis la 26<sup>a</sup> de julio. Tiam estos organizitaj ankaŭ pluraj eventoj cele al taŭga prezentado de nia asocio al vasta publiko.

La 94<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en 2009 okazos en Bjalistoko, Pollando, por omaĝi la 150<sup>an</sup> naskiĝdatrevenon de d-ro L.L. Zamenhof en lia naskiĝurbo mem. La urbestro de Bjalistoko, d-ro Tadeusz Truskolaski ĉeestis la estrar-kunsidon, kune kun la prezidantino de Bjalistoka Esperanto-Societo, s-ino Elzbieta Karczewska, kaj s-ro Aleksander Zdechlik, reprezentanto de Estraro de Pola Esperanto-Asocio. D-ro Truskolaski transdonis al la Estraro alvokon de bjalistokanoj por okazigo de la UK en ilia urbo. Dum unu semajno ĉirkaŭ 3500 personoj subskribis la alvokon. Krom entuziasman akcepton de la urbanoj, la urbestro promesis vastan apogon de la urbo al la organizado de la kongreso.



### Mesaĝo de la urbestro de Herzberg am Harz al kongresanaro

Tre estimataj gepartoprenantoj de la Esperanto-Mondkongreso en Yokohamo!

Kiel urbestro de Herzberg - la unua urbo de la mondo, kiu havas la oficialan kromnomon “Esperanto-urbo” - mi transsendas al vi la plej korajn bondezirojn pro sukcesa kongreso je la nomoj de la enloĝantoj, de la urba konsilantaro kaj je mia propra nomo.

Kun ĝojo kaj fiero mi informas vin, ke en Herzberg, ekde kelkaj jaroj oni instruas Esperanton en la lernejoj kaj oni uzas Esperanton por praktikaj interrilatoj (ekz. kun nia pola ĝemelurbo Gora).

Per tio la urbo agnoskas la valorojn de la Internacia Lingvo kaj volas subteni ĝin kiel gravan rimedon por la internacia kompreniĝo, amikeco kaj paco en la mondo.

La “Esperanto-urbo” estas via urbo: pro tio mi invitas vin, vizitu ĝin kaj bonfartu ĉi tie dum la UK-antaŭkongreso en 2008 antaŭ via vojaĝo al Roterdamo.

*Via Gerhard Walter*

### Lastaj atingoj de E-aktivado en la Germana Esperanto-urbo Herzberg

1. Apero de 4 diverstipaj Esperanto-bildkartoj pri la urbo.
2. Eldono de urboprospekto kun anoncoj de la gastronomio en Esperanto (eldonkvanto: 7.500 ekz.);
3. La 30<sup>an</sup> de junio 2007 estis inaŭgurita monumento honore al Joachim Gießner, fervojisto kaj elstara Esperanto-pioniro, aktiva en GEFA kaj IFEF, en la antaŭ-stacidoma parko.
4. Ĉirkaŭ 20 restoracioj petis esperantlingvajn manĝokartojn.
5. Dum la venontaj monatoj la urbo preparos dek unu belajn bonvenig- respektive revid-salutajn ŝildojn en Esperanto ĉe la enirvojoj al Herzberg.
6. Estas planite starigi, ankaŭ ĉe la stacidomaj kajoj, kvar grandajn blukolorajn oficialajn urboŝildojn kun la teksto: “Esperanto-Stadt Herzberg”, intenco probable realigota en la jaro 2008<sup>a</sup>.

Ĉiuj ni esperantistoj subtenu ĉi tiun unikan, signifoplenan, Esperantan realaĵon per nia ĉeesto kaj partopreno.

Por pluaj informoj vizitu la tt-ejon ĉe: [www.herzberg.de](http://www.herzberg.de)

# Kristnasko: mia bildo pri ĝi

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj devas sendi, ĝis la **15<sup>a</sup> de oktobro 2007**, siajn faritaĵojn al la jena adreso:

**ESPERANTO TRIESTE – CP 601 Trieste Centro  
IT-34101 TRIESTE - ITALIA**

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da faritaĵoj pri la supre indikita temo, en la kategorio:

1. desegnaĵo (ekz.: “kiel mi imagas tiun tradician feston”, “kiel mi rilatas al ĝi”);
2. rakonto, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin en mia familio, miaj pensoj pri tiu kristana festo, pri la kristnaskaj tradicioj en mia lando, regiono, urbo..., malgranda rakonto pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ka);
3. manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al Kat. 2 aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La “rakonto” estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

★ persona kaj familia nomoj; ★ aĝo; ★ lernejo kaj klaso; ★ poŝta adreso; kaj aldonita malgranda foto de aŭtor/in/o. Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2007. La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio. Premioj konsistos el libroj, kompaktaĵoj pri la temo, pokaloj, dum ĉiu konkursanto ricevos partopren-diplomon.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Trieste. Por kromaj detaloj/informoj: [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it) aŭ [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

## Kurta Kino Esperanto Festivalo

**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO** lanĉas la duan internacian konkurson pri kurtfilmoj, je libervola temo, ital- kaj/ aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvoj. La kurtfilmoj povas esti ankaŭ senparolaj. La kurtfilmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superu 15-minutan daŭron. Ĝi **NE** estos redonita. La aŭtoro sendu poŝte sian verkon ĝis la 15<sup>a</sup> de decembro 2007, en registrita koverto kaj kun rice-



vatesto al la adreso de Triesta Esperanto-Asocio (vd. supre). Ĉiuj alvenintaj verkoj estos prezentataj al publiko okaze de Semajno de Internacia Amikeco (18-25/02/2008). Pliaj informoj ĉe: [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it) kaj <http://www.blog.ialweb.it/>



## Internacia Konkurso pri Poezio "Kastelo de Duino"

Iniciatita de “Poezio kaj Solidareco” - Trieste, kunlabore kun Kolegio de Unuiĝinta Mondo de Adriatiko (*Duino-Triesto*) kaj kun patroneco de Princo *Carlo Alessandro della Torre e Tasso*, startas la 4<sup>a</sup> eldono, kun partoprena limdato je la 6<sup>a</sup> de januaro 2008. Partopreno estas senpaga sed nur por junul-

aro, ĝis 30 jaroj. Temoj de la konkurso estas: **VOĈOJ/SILENTO**. La temo estu komprenata en sia plej ĝenerala signifo.

La poeziaĵoj estas akceptitaj en la gepatra lingvo de la aŭtoroj aŭ/kaj en la internacia lingvo esperanto. Oni petas tradukon, ĉu en la italan, ĉu en la anglan, ĉu en la esperantan lingvojn. Ĵurio, konsistanta el poetoj kaj beletraj kritikistoj kaj plurlingve kapablaj, taksos ilin ankaŭ en la originala lingvo. Ĉiu konkursanto rajtas partopreni nur per unu poeziaĵo kun maksimume 50 versaĵoj.

★ Premioj: Unua, dua kaj tria premioj po 500 € al launaj tri klasifikitaj (parto de la premio estos devige asignita al iu solidareca kaj homarana institucio); antaŭviditaj ankaŭ malpli valoraj premioj kaj specialaj mencioj.

★ La poeziaĵoj de la gajnintoj kaj aliaj elektitaj inter la plej bonaj estos eldonitaj ĉe “IBISKOS Eldonejo Risolo”, sponsoro de la konkurso (la gajno el librovendado estos destinita al Fondiĵo LUCCHETTA-OTA-D’ANGELO favore al la infanaj milit-viktimoj). La poeziaĵoj estos surbendigitaj en la originala lingvo en kompakta disko.

★ Honora mencio por la plej bonaj verkoj de pli junaj ol 16-jaraĝuloj.

★ Honoraj mencioj por la tri plej bonaj lernejoj kiu partoprenos per kolektiva verko.

★ Ĉiu konkursanto povos peti senpagan aperigon de sia poeziaĵo en la konkursa ttt-paĝo: [www.castellodiduinoepoesia.it](http://www.castellodiduinoepoesia.it) La poeziaĵoj estu senditaj ĝis la 6<sup>a</sup> de januaro 2008 per elektronika poŝto al [valera@units.it](mailto:valera@units.it); la mesaĝo konsistu el la aliĝilo (vidu suben); la poeziaĵon oni sendu aldone je *word*- aŭ *rtf*-formatoj: ne akceptitaj aliaj; aŭ per ordinara poŝto al **Gabriella Valera Gruber** - Via Matteotti 21 - 34138 Trieste, Italia. En la letero estu aliĝilo kompletigita kaj deklaro pri neeldoniteco de la poeziaĵoj. Pri sendo-dato atestos la poŝta stampo, sed neniu verko estos akceptita post la eklaboro de la ĵurio. Viaj donitaĵoj en la aliĝilo estu: 1. Persona kaj familia nomoj; 2. Naskiĝdato; 3. Poŝtadreso kun poŝta kodo, urbo kaj lando; 4. Telefonnumeroj; 5. Retadreso; 6. Nacieco; 6. Titolo de la verko. Aldonu la jenan deklaron, subskribitan: Mi atestas, ke la poeziaĵo ... (titolo)..., per kiu mi partoprenas la internacian konkurson “Kastelo de Duino”, kvara eldono, estas mia originala verko, neniam antaŭe eldonita kaj premiita. Mi konsentas ĝian eventualan eldonon aŭ publikan prezentadon. Mi deklaras krome esti/ne esti (*forstreku la nevalidan*) enskribita ĉe SIAE (Societo Internacia Aŭtoroj kaj Eldonistoj), aŭ ĉe alia simila asocio pri protektado de aŭtoraj rajtoj. (La subskribo)

## Triesto kaŝita (sed ne tro!) FRONDO STARAS ĈE VOJKRUCIĜO

Pendantan de arbo aŭ fosto, laŭvoje en Karsto, hazarde ni renkontas hederbranĉon aŭ tigeton kun folioj, jam pro suno elsek-iĝintajn, sed daŭre havantan sian precipan signifon: inviti al halto ĉe proksima *osmiza* [ozmica]. Tiu frondo, loke nomita *frasca* [fraska], estas tradicia indikilo montranta – en la Karsta teritorio inter *Medeazza* [medeac'ca], *Monrupino* kaj *Caresana* [karezana] – kie gustume ĝui karstajn vinojn *Doc* [dok = kontrolita laŭ-origina nomo] kiel *Terrano* [ter'rano], *Malvasia* [malvazia], *Vitovska*, kune kun hejmpreparita peklita viando, kiel *Kraski Prsut*, nome karsta nekuirita ŝinko, *pancetta* [panĉet'ta = duongrasa lardo], *ossocollo* [os'sokòl'lo = salama specialaĵo el kola porkaĵo, salita], freŝa kolbaso, salamo, duonmatura fromaĝo kiel tiu nomita *Tabor*, enoleigitaj diverspecaj legomoj kaj ovaĵoj kun sezonaj herboj.

*Osmiza* estas slovena termino el la vortradiko *osem*, signifanta “ok”. Fakte, dum ok tagoj al lokaj produktistoj estis permesata vinvendado ĉe propra hejmo dum la epoko de imperiestrino *Maria Tereza* el Aŭstrio, kiu, per edikto publikigita fine de la 18<sup>a</sup> jarcento, inaŭguris tiun tipe printempan tradicion de la aŭstro-hungara imperio. Do, kutimo ĉi tie pluvivanta pli ol ducent jarojn.

Tiuj vendejoj, grandaj aŭ malgrandaj, nombras pli ol 150. Laŭvice dum kelkaj semajnoj, po unu aŭ du fojoj jare depende de siaj rimedoj kaj provizoj, la vinkulturistoj malfermas la pordojn de siaj hejmoj, kie troviĝas ĝardenoj, kun lignaj aŭ ŝtonaj benkoj kaj tabloj.

Aŭtentikaj kaj simplaj ejoj, kie eblas ankoraŭ nun flari parfumojn de la karsta kampara tradicio.



## Dimanĉon la 9<sup>an</sup> de septembro Festo de Amikeco ĉe Dreiländerecke

Jam ekde 1980, sur Monto *Forno*, oni festas la amikecon inter la ĉelimaj landanoj. Sur la pinto de tiu monto, kies nomo por aŭstroj estas *Dreiländerecke* kaj por slovenoj *Pec*, je alteco de 1508 metroj, apud la simbolo tie starigita siatempe, ankaŭ esperantistoj tradicie kunvenas, por renovigi siajn sentojn pri amikeco interpopola.

Ĉu ni ĉijare maltrafos tiun renkontiĝon? Mi esperas, ke ne. Ĉu denove ni surgrimpu tiun altaĵon, por vagadi de unu lando al alia, ĝui belan naturon, gustumi aŭstrajn, slovenajn aŭ italajn manĝaĵojn, kaj aŭdigi nian belan lingvon esperanto? Se via respondo estas jesa, anoncu vin ĉe TEA-sekretario: Sideja telefono - 040 763128; hejma 040 398562 aŭ perrete: testudo.ts@gmail.com

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com  
Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste  
tel/fakso: +39 040 763128  
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it  
Grupa ttt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina  
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italia  
Poŝtĉekkonto N° 10834349

**K**omence de oktobro startos unua- kaj dua-gradaj kursoj (informoj ĉe Elda), dum la Koruso VERDAJ ANĜELOJ ekos sian ekzercadon post interkonsento kun ties direktorino Devana. Sed, plej grave, jam ekde TUJ, ni komencos serioze prepariĝi por la evento de la jaro 2009<sup>a</sup>, nome la Jubilea Kongreso de IFEF-Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazonta en la lasta semajno de majo!

Reputacio de nia asocio estas alta en Esperantujo, do tiom pli ni devos labori serioze por ne malpravigi tiun onian taksadon: nu, ek al la laboro, por esti pretaj akcepti pli ol 300 fervojistojn el la tuta mondo!

La skizita, provizora programo, al kiu ankaŭ vi estas petata kontribui (kiom pli da kapoj, tiom pli da ideoj!) jam nun prezentiĝas tre riĉa kaj densa, kaj tio postulos ĉies sindediĉon kaj kunlaboremom, precipe koncerne la ekskursajn kaj turismajn aranĝojn.

Do, ni atendas vin ekde la 4<sup>a</sup> de septembro en VIA TEA-sidejo je la 19<sup>a</sup> horo.

*Mallonge pri...* *Thorsen-Apogo* Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon pligrandigi siajn kolektojn, ĉar ankaŭ ĉi-jare UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. Subvencion oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton.

La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15<sup>a</sup> de oktobro 2007. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin rete al <direktoro@co.uea.org>.

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bonharon de la Biblioteka Apogo, eblas konatiĝi per la retejo [www.poulthorsen.dk](http://www.poulthorsen.dk).

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bonharon de la Biblioteka Apogo, eblas konatiĝi per la retejo [www.poulthorsen.dk](http://www.poulthorsen.dk).



*Beletra Almanako* Post kel-

kaj tagoj estos lanĉita la nova literatura periodaĵo, pri kiu jam aperis en la majojunia Bulteno la koncerna anonco: temas pri la Beletra Almanako, aperonta du-foje jare. Ĝin prizorgas Jorge Camacho (ĉefredaktoro), Probal Daŝgupto kaj István Ertl (redaktoroj) kaj eldonas Ulrich Becker (Mondial, Novjorko).

Amplekso de la baldaŭ aperonta, freŝa unua numero estas 21x13 cm, kaj havas 176 paĝojn. Principe la almanakon oni ne devos aboni anticipe kiel revuon, sed povas mendi aŭ aĉeti kiel libron. Ĝi aperos en normala mezgranda libro-formato, kaj ĝi estas facile mendebla, pagebla, aĉetebla, recenzebla aŭ donacebla al amikoj.

Enhavon de la 1<sup>a</sup> numero vi povas trovi ĉe la jena retpaĝo: <http://www.librejo.com/beletra-almanako/ba1/beletra-alamanako-ba-1.html>

La prezo de Beletra Almanako estas 9 €, al kio aldoniĝas sendokostoj de 7 € ekster Usono kaj 2 € ene de Usono.

Pliajn informojn petu al jena retadreso [informoj@librejo.com](mailto:informoj@librejo.com). Mendante BA2 kaj BA3 kune, oni ricevos rabaton, nome po 6 € (plus sendokostoj)

Septembra Programo	
04 - mardo	20h00 - Unua postferiada renkontiĝo
07 - vendredo	20h00 - Ni parolu pri IFEF-Kongr. 2009
08 - sabato	Vinberrikoltado ĉe Marĉelo Trampuh
<b>09 - dimanĉo</b>	<b>Festo de Amikeco sur Monto Forno</b>
11 - mardo	20h00 - Vizito de Johano Sepers (NL)
14 - vendredo	20h00 - Prelego de Johano Sepers
18 - mardo	20h00 - Tradukada ekzerco
21 - vendredo	20h00 - Prezento de la Seminario: "Kulturo por socio sen bariloj"
25 - mardo	20h00 - Preparoj por 2009 <sup>a</sup> jaro
28 - vendredo	20h00 - Verboj, afiksoj, prepozicioj

Ĉiuvendrede, je la 15h30, ekde la 5<sup>a</sup> de oktobro, dum entute ses semajnoj, prelego/kurso pri Esperanto ĉe la Universitato de Triaguloj, Via Corti, Triesto.

Oktoobra Programo	
<b>02- mardo</b>	<b>18h00 - CORSO DE ESPERANTO</b>
05 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> esperante, itale, triestradialekte
09 - mardo	20h00 - Elfosado de taŭga teatraĵo
12 - vendredo	20h00 - <b>JAPANA VESPERO</b> (kun bildoj)
16 - mardo	20h00 - Preparoj por Karstaj Tagoj
19 - vendredo	20h00 - Marija Belošević parolos pri: <i>Kroata literaturo en esperanto</i>
23 - mardo	20h00 - Preparoj por Karstaj Tagoj
26 - vendredo	20h00 - Seminario pri Kulturo (vd. 21/09)
30 - mardo	20h00 - Preparoj por Karstaj Tagoj

# Ludoj, Ŝercoj, enigmoj...

Solvo de la ludoj aperintaj  
en la julia-aŭgusta TEA-Bulteno:  
**Flirtanta papilio: la ideo**  
**La piro kiun mi manĝis: la aĝo**

## Koramiko

Ĝi ĉion pri mi scias:  
malkvietajn  
esperojn,  
kaŝitajn sekretojn  
kaj ĉiutage la revojn.

Al ĝi mi konfidas  
ĝojajn kaj penojn,  
kiujn,  
samkiel juvelujon,  
por ĉiam ĝi plu gardas.

*Cerbumu,  
cerbumu...*



VIGLO

7	?	20	?	3	?	12	?	4	=	8
9	?	12	?	3	?	7	?	8	=	41

Vi devas anstataŭi la demandosignojn per kalkulsimboloj (+, -, x, :) tiamaniere, ke en ĉiu linio rezultu la nombro indikita. La simboloj estas uzablaj nur unufoje je ĉiu linio.



## FERIO EN ROMO

Virino estis ĉe sia Nov-Jorka frizisto por bela hararanĝo prepare al vojaĝo al Romo kun sia edzo. Ŝi menciis la vojaĝon al la frizisto, kiu komentis: "Romo? Kial iu volus iri tien? Ĝi tro plenplenas je homoj kaj estas aĉe malpura. Estas freneza ideo, deziri viziti Romon. Ĉiuokaze, kiel vi vojaĝos tien?"

"Ni flugos per *Continental*," ŝi respondis. "Ni ricevis tre bonan prezon!"

"*Continental*?" eĥis la frizisto. "Tiu estas terura aerlinio. Iliaj aviadiloj estas malnovaj, iliaj stevardoj estas malbelaj, kaj ĉiufoje la flugoj estas malfruaj. Kaj kie vi restados en Romo?"

"Ni estos ĉe ekskluziva malgranda hotelo, *Teste*, apud la Rivero Tiberio."

"Ne diru plue. Mi konas tiun hotelon. Ĉiu supozas, ke ĝi estos iom speciala kaj ekskluziva, sed efektive ĝi estas aĉa loĝejo, la plej malbona en la urbo! La ĉambroj estas malgrandaj, la servo estas malĝentila kaj la prezoj estas troaj. Do, kion vi faros, kiam vi estos tie?"

"Ni vizitos la Vatikanon kaj esperas vidi la Papon."

"Ho, tio estas tro!" ridis la frizisto. "Vi kaj alia miliono de homoj provantaj vidi lin... Li aspektas tiel granda kiel formiko. Do, bonŝancon laŭ ĉi tiu malĝojiga vojaĝo, kiun vi faros. Vi bezonos tiun bonŝancon."

Post unu monato, la virino denove venas por hararanĝo. La frizisto demandis ŝin pri ŝia veturo al Romo.

"Ĝi estis mirinda!" ekkriis la virino. "Ne nur ni ĉiufoje alvenis akurataj per unu el la novaj aviadiloj de *Continental*, sed la flugo estis superrezervita kaj oni altigis nin ĝis unua rango. La manĝo kaj vino estis bonegaj kaj mi havis belan 28-jaraĝan stevardon kiu servis min tute diligente. Kaj la hotelo estis nekredeble bona! Oni ĵus finis kvinmiliondolaran renovadon kaj nun ĝi estas juvelo, la plej altkvalita hotelo de la urbo. Ĝi estis simile superrezervita, do oni pardonpetis al ni kaj loĝigis nin en la ĉambraro de la posedanto, sen plusa kosto!"



"Nu," murmuris la frizisto, "ĉio el tio estas sufiĉe bona, sed mi certas ke vi ne vidis la Papon."

"Fakte, ni estis sufiĉe bonŝancaj, ĉar dum ni travagis Vatikanon, Svisa Gardisto frapetis min ĉe la ŝultro kaj klarigis, ke la Papo ŝatas renkonti iujn el la vizitantoj, kaj se ni bonvolus eniri lian privatan ĉambron kaj atendi, la Papo persone salutos nin. Kaj tiel estis: post kvin minutoj la Papo piediris tra la pordo kaj premis mian manon! Mi genufleksis kaj li diris al mi kelkajn vortojn."

"Ho, ĉu vere! Kion li diris?"

"Li estis dirinta: *Kiu faris al vi tiun aĉan hararanĝon?*"

(Fonto: Rido sanigas!)

